Mia nomo estas Ronald Glossop. Mi loĝas en la urbo Sankta-Luiso (Saint Louis) en la ŝtato Misurio (Missouri). Mi estas emerita profesoro de filozofio kaj la studado de paco. Mi estas ankaŭ direktoro de la organizo Infanoj ĉirkaŭ la Mondo kaj prezidanto de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto. Mi estas membro de UEA, ĉar mi volas subteni la organizon, kiu reprezentas kaj laboras por ĉiuj Esperantistoj. Mi ankaŭ volas ricevi la monatan revuon *Esperanto* por esti informita pri la multaj diversaj agadoj, kiujn Esperantistoj faras tra la tuta mondo, kaj la Jarlibron, kiun mi uzas por kontakti Esperantistojn en aliaj landoj. Kiam mi iris al Tajlando, mi povis trovi la retadreson de Esperantisto tie, kaj li multe helpis min ĉe la kongreso de Rotario Internacia en Bankoko dum la pasinta somero. Mi volas esti en la Delegita Reto de UEA, por ke Esperantistoj el aliaj landoj povu kontakti min, se ili venos al la mezo de Usono. Ankaŭ aliaj Esperantistoj, kiujn mi renkontis ĉe UK-oj aŭ en aliaj landoj, povas trovi mian retadreson en la Jarlibro. Pro Esperanto mi havas geamikojn en multaj landoj kaj mi povis viziti multajn landojn kiel Ĉinion kaj Japanion kaj Koreion kaj Italion kaj Brazilon, eĉ kvankam mi ne lernis tiujn naciajn lingvojn. Mi ankaŭ prelegis Esperante en la nova Universitato de Esperanto pri „Alfronti Militon." Vi povas rigardi tion ĉe *http://vimeo.com/user12638707/alfrontimiliton1*. En Ĉinio mi estas „Profesoro Ron."

## Universitato de Esperanto

Per la retejo *www.universitato.info* oni povas lerni kaj studi per Esperanto universitatajn temojn pri ne-Esperantaj aferoj. Ne-Esperantistoj nun povas agnoski, ke kompletaj, universitataj kursoj tute en Esperanto eblas kaj okazas. La Universitato de Esperanto baziĝas sur la nuntempaj modeloj de „Open Course Ware", kiel videblaj ĉe la Universitatoj de Yale kaj de Berkeley. Iliaj kaj la Esperantaj kursoj estas kompletaj, kun ĉirkaŭ 40 horoj da lecionoj. Ili estas filmitaj kaj disponeblaj interrete sub la licenco Krea Komunaĵo.

(*www.universitato.info*)

## Premioj de Fondaĵo Antoni Grabowski

Fondaĵo Antoni Grabowski celas subteni la Esperantan kulturon. Ĝi aljuĝas premiojn kaj subvenciojn mezume ĉiun 2-an aŭ 3-an jaron. En la Hanoja UK estis anoncitaj la ĉi-jaraj premioj. Premion de 650 usonaj dolaroj ricevis la elstara figuro de la Esperanta kulturo, specife beletro, la Nederlanda intelektulo Gerrit Berveling. Premion je la sumo de 500 dolaroj ricevis la Esperanto-aranĝo ARKONES.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

## La 125-jariĝo de Esperanto estis solenita en Pola Senato

Okaze de la jubileo de Esperanto kaj de la Eŭropa Tago de Lingvoj estis organizita konferenco en la Pola Senatejo kun ekspozicio flanke de Eŭropo-Demokratio-Esperanto - PL. La ekspozicion finance subtenis mecenato Etsuo Miyoshi, kiu estis feste akceptita kiel Honora Membro de EDE-PL. Okazis inaŭguro de Parlamenta-Senata Grupo por promocio de Esperanto, kiun gvidis prof. Edmund Wittbrodt. Sekvis inaŭguro de jubilea ekspozicio, kiu estis ankaŭ vizitata de reprezentantoj de la japana ambasadejo. Tra la ekspozicio gvidis vicprezidanto de EDE-PL E. Kozyra kaj la aranĝon filmis televido el Malbork. La konferencon malfermis vicprezidanto de Pola Senato Jan Wyrowiński kaj tra la konferenco gvidis M. Komarnicka. S-ro Miyoshi invitis la politikistojn kaj kelkajn Esperantistojn al festa vespermanĝo por pli detale priparoli venontajn paŝojn. (*Eŭropa Bulteno*, nr-o 120 kaj *La Ondo de Esperanto, http://sezonoj.ru/2012/10/217senato/* )

## Pli riĉa kaj ampleksa biblioteko planata por renovigita Lernu

La nova biblioteko, kiu lanĉiĝos kun la nova Lernu komence de 2013, estos multe pli riĉa ol la nuna; ĝi inkluzivos multajn verkojn de Esperanto-literaturo, kaj ankaŭ sonojn kaj filmetojn kun akompana teksto. La planata biblioteko estos utila aparte al komencantoj, pro la eblo traduki vortojn per simpla klako, sed ĝia enhavo estos sufiĉe profunda por esti interesa al Esperantistoj de ĉiuj niveloj. Se vi volas kontribui al la projekto, la Lernu-teamo (teamo@lernu.net) serĉas subtenantojn kaj volontulojn por helpi enmeti tekstojn. (http://kampanjo.ikso.net/eo/) (*www.liberafolio.org/2012/nova-reta-biblioteko-aperos-ce-lernu*)

## Artlibro pri arkitekturo en Esperanto

La tradukentrepreno LinguaForce (Rennes, Francio) lingve helpis la germanan arkitektur-studion Kuehn-Malvezzi por la ekspozicio „Komuna Fundamento" prezentata okaze de la 13-a internacia ekspozicio pri arkitekturo „Common Ground", kiu okazis kadre de Venecia Bienalo. La arkitektura studio Kuehn-Malvezzi kreis tion, kio verŝajne estas la unua artlibro en Esperanto pri arkitekturo. „Komuna Fundamento" estas Esperantigo de „Common Ground", la nomo de la ĝenerala ekspozicio. Samokaze, libro samnoma estis eldonita tute en Esperanto de Mousse Publishing (*Komuna Fundamento*, 33 €, ISBN 978-88-6749-027-1). (www.moussepublishing.com/printed/kuehn_malvezzi/komuna_fundamento.php)

## Mazaradelvalo, 79-a Itala Kongreso de Esperanto

En Mazaradelvalo (Sicilio) partoprenis 328 homoj en la 79-a Itala Kongreso de Esperanto, okazinta en Aŭgusto. Pli ol la duono de la kongresanoj estis eksterlandanoj el ĉiuj 5 kontinentoj. Kongrestemo estis fama citaĵo el la festparolado de L. L. Zamenhof ĉe la 1-a Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer (1905): Sed homoj kun homoj. En Mazaro, la Kongresa Komitato trovis ĉe la urbestro ne nur kunlaboremon, sed ankaŭ entuziasman aliĝon al Esperantismaj idealoj; la urbestro mem deziresprimas, ke la urbo iĝu simbol-urbo de Esperanto. Inter la iniciatoj menciindas kursoj de Esperanto en ĉiuj Mazaraj lernejoj, en kiuj partoprenis pli ol 500 lernantoj, dum pliaj kursoj estas planitaj por sekvontaj jaroj. En la gazeto *La Ondo de Esperanto* Renato Corsetti raportas pri la tre vigla, interesa kaj – ĉiusence – „kunveniga" kongreso. Venontjare la Itala Kongreso okazos en Kastelaro (Castellaro) apud Sanremo ĉe la Bordo Lazura . (Eŭropa Bulteno Septembro 2012, No 119)

(*http://sezonoj.ru/2012/09/la-79a-kvazauitala-esperanto-kongreso/*)

## 170 000 artikoloj en la Esperanta Vikipedio

Septembre la Esperanta Vikipedio (http://eo.wikipedia.org) atingis 170.000 artikolojn. Ĝi aktuale tenas lokon 27 kompare kun naciaj Vikipedioj, antaŭ ekzemple la Dana, Serba, Litova kaj Hebrea versioj. Ĉiuhore estas ĉ. 10.000 paĝorigardoj ĉe la Esperanto-versio. Laŭ la ofteco de uzado Esperanto okupas lokon 41. La Esperanto-Vikipedio tiurilate ne estas unika projekto: Esperanto dum la pasintaj jaroj ekhavis tradukojn de Facebook, Mozilla Firefox kaj de la Linux-versio Ubuntu; ĝi estas traduklingvo de Google Translate kaj ĝi eniris kun pli ol 200.000 frazoj la multlingvan frazokolekton Tatoeba *http://tatoeba.org/epo/wall/*

*index). (http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Internacia_Vikipedio#Pli_ol_100_000_artikoloj*)

(Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand)

## En Prago nun ekzistas haltejo kun la nomo Zamenhof

Haltejo „Stavoservis" havas novan nomon laŭ la strato de Zamenhof. Tiu ĉi ŝanĝo ne estas ideo de Esperantistoj, sed de Transporta kompanio de Prago. Celo estas faciligi al homoj vojaĝojn kaj pli facile trovi konekton al la strato de Zamenhof, ĉar antaŭe oni devis scii, ke oni serĉu „Stavoservis" (Konstru-servo). (*www.esperanto.cz/eo/aktuality/en-prago-nun-ekzistas-haltejo-de-zamenhof.html*)

## La UEA-revuo *Esperanto* rete por membroj kun gvidlibro

En la oktobra numero de la revuo Esperanto aperas la kotiztabelo de UEA por la jaro 2013. Ĉiuj eŭraj kotizoj restas samaj kiel en 2012. Grava ŝanĝo koncernas la kategorion Membro kun Gvidlibro (MG). En 2013 ankaŭ la membroj, kiuj pagas MG-kotizon, rajtos legi la revuon Esperanto rete. Sekve, en la landoj, kies kotizo estas sama kiel por Nederlando, sufiĉas pagi 10 € por tio. Membroj kun Gvidlibro eĉ povas facile regajni la kotizon utiligante sian rajton mendi dufoje dum la jaro librojn k.a. varojn ĉe la Libroservo kun 10%-a rabato. La kotiztabelo por 2013 kaj membro-aliĝilo troviĝas ankaŭ en la retejo de UEA.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

## Aŭskulti la faman Esperantiston Ivo Lapenna

Novaj elŝuteblaj sondosieroj de aŭ pri prof. d-ro Ivo Lapenna troveblas en la hejmpaĝo de Fondaĵo Ivo Lapenna okaze de la 125-jara datreveno de Esperanto: *www.ivolapenna.org/125.htm*. (Birthe Lapenna, Fondaĵo Ivo Lapenna, informas Osmo Buller)

## Premio Deguĉi al Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia

Ges-roj Grattapaglia ricevis la ĉi-jaran Premion Onisaburo Deguĉi. La Estraro de UEA aljuĝas tiun „Esperantistan pac-premion" pro agado, kiu per Esperanto antaŭenigis internacian amikecon kaj solidarecon en la spirito de d-ro L.L. Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. La premio estis starigita en 1987 per donaco de Oomoto; ĝi konsistas el diplomo, monsumo de 2.000 € kaj donaceto de Oomoto.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

## Ĉu la plej granda Esperanto-libro?

Kiel rezulto de 20-jara laboro de d-ro Máthé Árpád, aperis en Budapeŝto „Bibliografio de Esperantaj periodaĵoj." La datumbaza kolekto listigas 14.173 Esperanto-gazetojn, revuojn kaj aliajn periodaĵojn ekde 1887 ĝis hodiaŭ, kun iliaj nomoj, eldonjaroj, redaktoroj, ĉefaj sciindaĵoj, ktp. Verŝajne la libro estas unu el la plej grandaj Esperanto-libroj, ĝi pezas 3,3 kilogramojn kaj enhavas 1155 paĝojn en formato A4. La datumbazo de la periodaĵoj aperas ankaŭ en pdf-formato, kiu ebligas rapidan serĉadon kaj trovon de unuopaj esprimoj. Redaktoro de la bibliografio, d-ro Máthé Árpád estas kontaktebla pere de la adreso: *oficejo@eventoj.hu*

(Ret-Info)

## Reta C1-Kurso en la universitato de Krakovo

Se vi deziras plialtigi vian konon de Esperanto je unu nivelo, jen eblo partopreni kompletan, baldaŭ komenciĝontan en Interreto universitatan C1-kurson. Ĝi estas oficiala kurso de la fama universitato, Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando. La propono koncernas tri eksterlandanojn (el la tuta Okcidenta Eŭropo, inkluzive de la okcidenta parto de Skandinavio).

Jagelona Universitato havas ĉiajn eblojn, helpi esperantistojn el diversaj landoj lerni la lingvon je supera nivelo, kaj ni foje invitas lernemajn personojn. La kursoj estas utilaj precipe por tiuj, kiuj ne trovas lerneblon en sia loĝloko. Partoprenis ilin jam sukcese kaj ĝoje esperantistoj el kelkdekoj da landoj.

La lernado disvolviĝos plene en Interreto, vive, realtempe. La lecionoj okazados 1-2-foje semajne, dum unu universitata jaro (du semestroj). Unu el la lerntagoj estos merkredo (eventuale jaŭdo), komenco de la leciono: 20.45 (la horo en Pollando). La alia tago estos interkonsentita kun la partoprenantoj.

La tuta unujara, 90-hora kurso (+ 30 horoj da propra, gvidata ret-lernado) kostas 387 eŭrojn.

Internacieco de la partoprenantaro de niaj kursoj donas pli da ebloj por natura konversacio dum kaj ekster la lecionoj. Ĝi ankaŭ kontribuas al interkultura pliriĉigo de la enhavo de parolaj aktivaĵoj.

Informoj, aliĝoj: http://esperanto.instruado.jag.univ.pl

**Maria Majerczak**
Gvidantino de Esperanto-instruado en Jagelona Universitato, *mmajerczak@gmail.com*

## Esperanto-ponto en pola urbo Bydgoszcz

Okaze de 125-a datreveno de Esperanto Konsilio de la urbo Bydgoszcz decidis honorigi la jubileon per donado de la nomo „Most Esperanto" al la ponto-konstruaĵo ĉe la rivero Brda. Oktobre okazis oficiala malkovro de du tabuloj kun surskribo „Most Esperanto" en ambaŭ flankoj de la ponto. La ceremonion gvidis en Esperanto (!) kaj Pola lingvo Lech Zagłoba, prezidanto de la urba Komisiono pri Kulturo kaj Edukado. La ceremonion partoprenis kelkdek personoj el Pollando kaj gastoj el Germanio, Kazaĥio, Rusio kaj Senegalo; raportis pri ĝi ankaŭ la urba televido.

(Andrzej Grzębowski kaj Ret-Info)

**Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher**

Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen

# Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

## Folge 8: Bibliotheksschätze – bewahren für die Nachwelt?

**„Bibliotheken enthalten Schätze, die sie für die Nachwelt erhalten", so die gängige Meinung vieler Mitmenschen, und das wird ja auch immer so propagiert. Aber: erhalten unsere Bibliotheken wirklich *die ganze gedruckte Produktion heutiger und vergangener Generationen* für unsere Nachfahren? Es hat sich gezeigt, dass dies nur eine naive Vorstellung ist. Wie das? – Oft denke ich mir: „Ist nur gut, dass man nicht die Zeit hat, in *allen* Diskussionslisten im Netz mitzulesen, welche unter dem Thema Bibliotheken und Archive laufen; denn da tun sich gelegentlich haarsträubende Abgründe auf."**

Aufgrund des begrenzten Platzes hier nur eine Kurzfassung: Der Doyen und Nestor der Bibliotheks- und Informationswissenschaft in Berlin, Prof. Dr. Walther Umstätter [1], schrieb Ende September 2012 in einer Replik der Netzliste *InetBib*[2]: „Bezüglich des Eigentums hatten wir bisher die vereinfachte und damit falsche Vorstellung, dass wir in den Bibliotheken der Welt deren Eigentum in die Regale stellen und für die Nachwelt aufheben. Wenn dabei das eine oder andere verloren ging, wuchs der Wert in den restlichen Bibliotheken, und wir hatten genug Redundanz, um das scheinbar Wichtigste[3] archivarisch zu erhalten." und weiter, „…dass bei den gedruckten Büchern eine Redundanz von etwa 100 Büchern angestrebt wurde, während bei den flüchtigen digitalen oft nur ein oder zwei Kopien bei den Verlegern für ausreichend gehalten werden."!
Das gäbe jetzt Anlass, über Langzeitarchivierung und Datensicherheit nachzudenken; elektronische Dokumente sind flüchtig, und es ist offen, ob Verlage (Google mit eingeschlossen) die Funktion einer Digitalen Bibliothek übernehmen können (und wollen). Die größten Hürden dabei: Wer übernimmt diese Aufgabe, wenn ein Verlag stirbt? Wer garantiert uns die Informationsfreiheit, ohne zu hohe Kostenbarrieren aufzutürmen? Verlage sind an (archivierter) Information nur interessiert, solange sich das finanziell trägt. Darum war dies bisher Aufgabe der öffentlichen Hand. Vielleicht müsste man dieser Thematik mal eine eigene Folge widmen.
Auf einen anderen Aspekt mit eigener Problematik verwies die Antwort des Kollegen Klaus Graf: „Vor langer Zeit stellte ich fest, dass die ... Ausgabe 1888 eines Buchs ... in deutschen Bibliotheken nicht nachgewiesen war." In der Folge führte er aus, dass die Zeitschriftendatenbank zwar zwei Standorte für eine gesuchte Zeitschrift nachweise, die Bände und Hefte dort aber als vermisst geführt seien. Diesen Vorgang bezeichnet er gar als „unerwartetes Sittenbild ostdeutschen Bibliothekswesens nach 1989" und endet schließlich mit der Frage, ob da „womöglich ein unterbezahlter Bibliothekar nach 1989 die restlichen Hefte geklaut" habe. Eine ganze Reihe weiterer Beispiele folgten.
Zu dieser **schleichenden Bibliotheksenteignung**, die immer mehr um sich greift, meinte dann Prof. Umstätter: „Ich befürchte, dass die Verluste in Bibliotheken, durch Brände, Kriege, Wasserschäden, Schädlingsbefall oder Vandalismus weitaus größer sind, als weithin angenommen. Hinzu kommt, dass die Gefahr bei heutigen Freihandbibliotheken, insbesondere bei alten teuren Rara[4], besonders stark wächst, ohne dass das immer bekannt wird, weil Gesamtrevisionen immer zeitaufwändiger, teurer und seltener werden."
Eine Lösung ist dabei sicherlich eine verbreiterte Redundanz mit diversifizierter Dislozierung der betreffenden Bestände. Jedoch müssen wir uns angesichts solcher Meldungen schon überlegen, ob dies ausreichen wird, ob diese Strategie die richtige ist und vor allem, ob sie die einzige sein kann oder darf.
Andererseits sind wir in Aalen der Ansicht, dass man nicht alles haben *muss*, erst recht nicht, wenn es nur als Kopie erhältlich wäre (oder wenn sichergestellt ist, dass die Bayerische Staatsbibliothek oder andere wichtige Sammlungen bereits Exemplare davon besitzen). Dafür sorgt schon die Orientierung am Etat, der uns zur Beschränkung zwingt. Glücklicherweise gibt es Redundanz, auch bei den Beständen der Esperanto-Bibliotheken! Wenigstens summarisch sollen hier einige große Bibliotheken in Mitteleuropa mit Esperantobestand genannt werden[5]:
Die Biblioteko Hodler der UEA in Rotterdam, das Esperantomuseum der Österreichischen Nationalbibliothek mit der Sammlung für Plansprachen in Wien, Die Deutsche Esperanto-Bibliothek in Aalen, das Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale (CDELI) in La Chaux-de-Fonds, Sammlung des FAJSZI Károly, die heute von der Landa Fremdlingva Biblioteko in Budapest betreut wird, die Biblioteko Butler der Esperanto-Asocio de Britio und das ehemalige Hispana Esperanto-Muzeo (HEM), das nun unter Museu d'Esperanto de Subirats firmiert …

**Utho Maier**

1) www.ib.hu-berlin.de/~wumsta/infopub/index.html
2) *www.ub.uni-dortmund.de/listen/inetbib/msg48529.html*
3) Bestandsgeschichte ist häufig auch Verlustgeschichte!
4) Möglicherweise hat man heutzutage zunehmend Rara, von denen man noch gar nicht weiß?
5) Eine kommentierte Auflistung auf unseren Netzseiten (erscheint demnächst: esperanto-aalen.de/trezoroj.htm) wird dann auch Verweise auf Online-Kataloge nennen und umfangreicher, wenn auch keineswegs erschöpfend sein – im Netz tun sich immer wieder neue Funde auf.

# Konstanz: Historiaj dokumentoj en urban arkivon

**Okaze de la esploroj por la libro de Hans-Dieter Kuhn „Die Plansprachen Volapük und Esperanto in Konstanz“ (aperinta 2010 en Hartung-Gorre Verlag, € 14,80) retroviĝis tre interesaj kaj ampleksaj dokumentoj pri la reaktivado de la Esperanto-vivo post la dua mondmilito en la sudokcidenta parto de Germanio, en la tiama france okupita zono.**

Surspure de la skribita „Historio de la Esperanto-Asocio KOMPRENO“ de Walter Poppeck, per sufiĉe hazarda ŝanco ni retrovis la Konstancan Esperanto-postlasaĵon de la unua sekretario de tiu asocio, Bernhard Wnuk (1916-1953) ĉe ties nepo, la aktoro Oliver Wnuk, en Berlino.

Post siaj analizaj studoj por sia libro, Hans-Dieter Kuhn transdonis la kompletan kolekton de tiuj vere historiaj paperoj al la urba arkivo de Konstanco, kompreneble kun la afabla permeso de la familio Wnuk.

Laŭ mia opinio tiuj du heredaĵoj de Wnuk kaj Poppeck respegulas krom la tre malfacilaj kaj malriĉegaj cirkonstancoj la ardan deziron pacigi la germanan kaj la francan popolojn. La tiama franca milita administracio en Baden-Baden eĉ iom bonvole subtenis Esperanton tiucele, havante kelkajn Esperantistojn en siaj vicoj. Krome baldaŭ videbliĝis denove la iamaj diferencoj inter la tiel nomata socialista kaj la neŭtrala parto en la ekestanta Esperanto-movado, pri kiuj detale jam skribis Ulrich Lins.

Ni Konstancanoj publikigas tiun „negravaĵon“ por eblaj estontaj esploroj de aŭtentikaj fontoj, kaj ni pensas, ke *Esperanto aktuell* estas bona loko, por ke la dokumentoj ne perdiĝu post nia generacio.

**Irmtraud Bengsch**
Am Briel 61, 78467 Konstanz.

# Jarkunveno 2012 de REFA

**En modesta formo, sed des pli lukse – en mirinda loko Băile Felix konferencis ĉi-jare la Rumana Esperanto Fervojista Asocio, de la 14-a ĝis la 17-a de septembro.**

Certe neniu bedaŭris la iom streĉan alveturon! Pluraj plilongigis la restadon kaj ĝuis la unikan termobanejon. Ankaŭ mi, ĉar jam delonge mi aŭdis pri tiu – laŭdire mirakla – termobanejo Băile Felix proksime al Oradea (Bihor). Mi profitis la okazon, por esplori la diversajn ofertojn kaj la efikon de la akvo.

Tro rapide pasis la ok pleje sunbrilaj tagoj kaj ĉe la adiaŭo mi jam diris al la afablaj hotelservistinoj: „La revedere“! Ĝis la revido! Kaj tion ne nur pro ĝentileco!

Kiel soldato en terura milito – kuŝinte monatojn seninterrompe en malsekaj kavernoj kaj tero, mi spertis, kion signifas suferi je reŭmatismo ktp. Necesas konvena termofonta akvo!

Persiste mi fine sukcesis privenki tiun turmentan malsanon kaj do ankaŭ prevente mi nun feriadas prefere en lokoj kun termobanejoj.

La lastajn pli ol 30 jarojn mi pasigis tiucele en la gastama najbara lando Hungario, kiun mi ankaŭ estonte ne tute neglektos, malgraŭ la perdo de konvena restadejo (motelo)! Ja temas pri lando, kiu saĝe kunligas kaj sperteble solvas socialajn kaj ekologiajn problemojn.

En Băile Felix mi trovis – dank`al REFA – aldonan, ĉiusence unikan ŝancon. Proksime al la banejo situas prezindaj hoteloj, parte kun propraj basenoj, libere kaj senpere utiligeblaj.

Kiu staras malantaŭ tiuj elektitaj, ŝajne kutimaj aranĝoj? Jam ne estas enigmo: Jes, nia IFEF-prezidantino, Todor Rodica! Kiu partoprenis en la lastaj grandiozaj ofertoj en Rumanio, jam scias, ke Rumanio estas nepre esplorenda kaj vizitinda lando.

Rilate la jarkunvenon menciindas ankaŭ la fakto, ke ĉefe junaj lernantoj de nia internacia lingvo sekvas kursojn sperte gvidatajn de profesoro Trifoi Mihai.

En Rumanio evidente pli rapide maturiĝas la kunlaborado de IFEF kaj ILEI. Restas la espero, ke laŭ la unuanima interkonsento sekvos ankaŭ la aliaj landoj.

Sincerajn gratulon kaj dankegon pro ĉio ĉi! „La revedere“ en la venontjara jarkunveno en Bukareŝto!

**Martin Stuppnig**

## Ein Tod in Auschwitz

# Julius Glück und sein Leben für Esperanto

**Marcel Reich-Ranicki hielt Ende Januar 2012 im Deutschen Bundestag eine ergreifende Rede. Darin erinnerte er an einen Tag vor siebzig Jahren, den 22. Juli 1942: An diesem Tag begann die Deportation der Juden aus dem Warschauer Ghetto nach Treblinka**



Der Abtransport dauerte bis Mitte September. Am 5. September wurde Zamenhofs Tochter Lidia verschleppt. Im Monat zuvor hatte ihre Schwester Zofia und beider Tante Ida, Zamenhofs Schwester, das gleiche furchtbare Schicksal getroffen. Anfang September folgte ihnen Izrael Lejzerowicz, ein namhafter Publizist der Esperantobewegung. Im Jahr zuvor, am 19. Oktober 1941, war im Warschauer Ghetto der beliebte Poet Leo Belmont, ein Esperantist der ersten Stunde, gestorben.

Über diese Opfer des Nationalsozialismus ist schon häufig geschrieben worden, im Gegensatz etwa zu einem anderen jüdischen Esperantisten, der ebenfalls vor siebzig Jahren ermordet wurde. Seiner soll daher hier gedacht werden: Julius Glück.

Julius Glück wurde am 12. März 1877 in Duschnik (Daleké Dušníky) in Mittelböhmen als deutschsprachiger Bürger Österreich-Ungarns geboren. Er studierte Ingenieurwesen, Naturwissenschaften und Philosophie in Prag und Wien und war zunächst als Gymnasialprofessor tätig. Im Jahre 1907 lernte er Esperanto. 1910 erschien in Wien das von Glück zusammen mit dem ungarischen Arzt Edmund Sós verfasste Lehrbuch Vollständiger Lehrgang der internationalen Hilfssprache Esperanto; es erlebte bis 1930 sieben Neuauflagen mit insgesamt 35.000 Exemplaren. 1931 erschien in Berlin ein weiteres Lehrbuch von Julius Glück: Esperanto für jedermann.

Eine maßgebliche Rolle spielte Glück bei der Planung des Achten Weltkongresses 1912. Das im russischen Teil Polens gelegene Warschau kam als Ort für den Jubiläumskongress („25 Jahre Esperanto“) nicht in Frage. Als 1. Sekretär des Verbandes deutsch-österreichischer Esperantogruppen schlug er 1909 nach Abstimmung mit den Esperantisten anderer Nationalitäten der Habsburger Monarchie vor, den Kongress in einer Stadt des österreichisch-ungarischen Reiches abzuhalten. 1911 fiel – gegen die Bedenken Zamenhofs – die Entscheidung für Krakau. Julius Glück stimmte die Esperantisten schon früh auf einen Kongress ein, bei dem das Völkerverbindende im Vordergrund stand, der zugleich aber neben den Gemeinsamkeiten zwischen den Völkern Österreich-Ungarns sehr deutlich die Verbundenheit mit Polen manifestierte. So kam es in Krakau, der alten polnischen Königsstadt, im August 1912 zu Hochrufen: „Vivu Polujo, vivu Poloj!“. Nach dem Kongress gab Glück ein prächtiges Gedenkalbum heraus.

Im Ersten Weltkrieg Offizier in der österreichischen Armee ließ sich Glück nach dem Zusammenbruch in Berlin nieder. Dort wurde er Handelsdirektor einer Fabrik. Seine Tätigkeit für Esperanto setzte er fort. Er schrieb Werbeartikel für etwa 40 deutsche Zeitungen und machte bei mehr als 100 Sendungen von Radio Berlin mit. 1926 gab er sechs Hefte für den Selbstunterricht des Esperanto mithilfe des Rundfunks heraus. Bis 1933 leitete er 208 Esperantokurse.

Am 22. November 1932 ehrten die Berliner Esperantogruppen Julius Glück aus Anlass seines Silberjubiläums als Esperantist. Die antijüdische Politik der Nazis zwang ihn 1933 zur Ausreise nach Paris. Auf Vermittlung von Andreo Cseh, mit dem er Anfang 1931 in Berlin und Potsdam mehrere Wochen lang Kurse für insgesamt 900 Personen abgehalten hatte, hielt Glück in einigen französischen Städten Kurse ab, die einem „Triumphzug“ glichen. Von Ende 1935 an lebte er in den Niederlanden und arbeitete dort unter anderem für die Verlage Thieme und J. Muusses. In letzterem erschienen 1937 von ihm selbst verfasste Broschüren über die Weltkongresse in Krakau und Warschau, die Abhandlung La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo und eine kleine Studie zu den polnischen Pionieren Antoni Grabowski und Kazimierz Bein (El la klasika periodo de Esperanto). Als die Niederlande im Mai 1940 von deutschen Truppen besetzt wurde, konnte der erkrankte Glück nicht rechtzeitig fliehen. Am 1. September 1942 wurde er in das Lager Westerbork eingeliefert, von wo er am 4. September nach Auschwitz deportiert wurde. Dort wurde er am 7. September in der Gaskammer ermordet.

Man kann Julius Glück, für den der Esperantounterricht immer im Vordergrund stand, als einen Mann der Praxis bezeichnen. Gleichzeitig war er ein großer Idealist. Dies belegt sein Einsatz für den Krakauer Weltkongress, den er als beispielhaft für eine bessere Welt bezeichnete; ebenso eine leidenschaftliche Rede, die er am 4. April 1922 auf einer vom Esperanto-Verband Berlin zum Gedenken an Zamenhof veranstalteten Feier hielt. Glück sprach davon, dass „die Zeit der Menschenverständigung, der Eintracht und der Verbrüderung“ mit Sicherheit kommen werde.

Es ist erschütternd, sich beim Lesen dieser zuversichtlichen Worte in Erinnerung zu rufen, dass Julius Glücks Leben 30 Jahre nach dem Kongress im nur knapp 70 Kilometer von Krakau entfernten Auschwitz vernichtet wurde.

**Ulrich Lins**

# „Ratkaptista bando“ en Hameln jubileis

**Invitis al koncerto de la konata muzik-grupo Kapriol’ la Esperanto-grupo de Hameln, „La Ratkaptista Bando“, por festi sian 25-jaran ekziston, kaj 46 Esperantistoj de Bielefeld ĝis Hamburgo, ja eĉ el Belgio, Nederlando, Slovakio kaj Koreio kunvenis jam dumtage por festi kun la amikoj el Hameln la jubileon.**

Preskaŭ sama nombro da vilaĝanoj, urbanoj kaj aliaj ne-Esperantistaj muzikŝatantoj venis al la koncerto. Antaŭtagmeze oni renkontiĝis por ĉiĉeronado tra la historia urbocentro de Hameln kaj posttagmeze por viziti la renovigitan muzeon. Dum la manĝado tagmeze kaj vespere restis sufiĉe da tempo por babili kaj interŝanĝi travivaĵojn. Salutvortojn transdonis Anne Höpken de la Esperanto-grupo Unterweser (malsupra Visurgo) por la amikoj de la supra Visurgo. Kaj Zsófia Kóródy transdonis al la prezidanto de la Hamelna grupo, Heinz W. Sprick, la atestilon por la C1-lingvoekzameno, kiun li dumsomere sukcese trapasis. Dimanĉon antaŭtagmeze oni renkontiĝis al vilaĝa promenado tra la vilaĝo Fuhlen, kiu sukcese partoprenis en la konkurso „Nia vilaĝo havas estontecon“. La internacia gastaro ŝatis interŝanĝi spertojn kaj ekscii pri la vilaĝa vivo en Belgio, Nederlando kaj Germanio.



„Kapriol’!“ dancas kun la gastoj cirklo-dancon kiel kanonon.

# Mitgliedsbeiträge und Spenden 2012

**Mitgliedsbeiträge und Spenden können Sie bei Ihrer Einkommensteuererklärung als Sonderausgabe geltend machen. Soweit die Zahlung 200 € nicht übersteigt, müssen Sie keine Zuwendungsbescheinigung des Deutschen Esperanto-Bundes (D.E.B.) einreichen, sondern es geht auch so:**

Der beste Nachweis ist der Originalkontoauszug. Alternativ wird in der Regel anerkannt:

- ein Ausdruck des Kontoauszugs beim Homebanking.
- der Bareinzahlungsbeleg mit dem Vermerk der Bank „Zahlung erfolgt“,
- der von der Bank quittierte Überweisungsbeleg

In den letzten beiden Fällen müssen auf dem Bankbeleg erscheinen:

- Name und Kontonummer des Auftraggebers
- Name und Kontonummer des Empfängers
- Betrag und Buchungstag
- in der Betreffzeile der Vermerk „Spende“ oder „Mitgliedsbeitrag“

Zusätzlich müssen Sie die unten stehende Bescheinigung über die Gemeinnützigkeit des D.E.B. dem Beleg beifügen.

Wenn Sie schon für 2011 eine Bestätigung über Ihren Beitrag entweder unaufgefordert erhalten haben oder um regelmäßige Zusendung gebeten haben, ist dieser Wunsch im Verwaltungssystem iDiS registriert und wird auch für 2012 berücksichtigt werden. Bei höheren Beträgen als 200 Euro kommt eine Zuwendungsbestätigung ebenfalls automatisch. Die Zuwendungsbestätigungen werden bis spätestens Ende März 2013 verschickt. Sollten Sie bis dahin eine erwartete Zuwendungsbestätigung nicht erhalten haben, wenden Sie sich bitte an unseren Schatzmeister Andreas Diemel (*gea.tr@esperanto.de*).

Die Bescheinigung über die Gemeinnützigkeit können Sie sich aber auch jederzeit von folgender Seite im Netz herunterladen: *http://www.esperanto.de/deb/quittungen.html*

Ein Tipp: Wer seinen Jahresbeitrag 2013 schon im Dezember 2012 überweist oder einziehen lässt, kann den Betrag 1 Jahr früher absetzen.

## Wie viel haben Sie 2011 mit Ihrem Vollbeitrag von 72 € wofür bezahlt?

**Die Mitgliedsbeiträge im ersten Jahr nach der Erhöhung deckten die Ausgaben ab, es blieb sogar ein Überschuss, der künftig für mehr Aktivitäten verwendet werden könnte. Außer den unmittelbaren Ausgaben für Werbung (Rechnungen) sind noch mittelbare anzusetzen, die in den Gehältern, in den Kosten fürs Berliner Büro und in den Reisekosten u. ä. stecken.**

| | | |
|---|---|---|
| Gehälter + Sozialabgaben | 9,94 € | 13,8 % |
| Berliner Büro | 1,80 € | 2,5 % |
| Reisekosten | 3,12 € | 4,3 % |
| Büromaterial | 1,38 € | 1,9 % |
| Telefon | 0,19 € | 0,3 % |
| Bankgebühren | 0,18 € | 0,2 % |
| **Zwischensumme** | 16,60 € | 23,0 % |
| Werbung (nur unmittelbare) | 2,64 € | 3,7 % |
| Subventionen (LVs, Ortsgruppen) | 9,40 € | 13,1 % |
| Beiträge UEA, EEU | 1,89 € | 2,6 % |
| Unterricht (Herzberg, u.a.) | 13,67 € | 19,0 % |
| Esperanto aktuell | 11,79 € | 16,4 % |
| Deutscher Esperanto-Kongress | 0,00 € | 0,0 % |
| Printempa Semajno Internacia | 0,00 € | 0,0 % |
| Esperantista Migrado Aŭtuna | 0,00 € | 0,0 % |
| Deutsche Esperanto-Bibliothek | 2,99 € | 4,2 % |
| Deutsches Esperanto-Institut | 0,00 € | 0,0 % |
| Rundreisen ausl. Referenten | 0,25 € | 0,3 % |
| Marie-Hankel-Zentrum Dresden | 0,36 € | 0,5 % |
| **Zwischensumme** | 59,60 € | 82,8 % |
| Überschuss | 12,40 € | 17,2 % |
| **Summe** | 72,00 € | 100,0 % |

✂---------------------------------- *kopieren oder ausschneiden* ----------------------------------✂

## Bescheinigung über Gemeinnützigkeit

Der Deutsche Esperanto-Bund e.V. ist nach dem letzten uns zugestellten Freistellungsbescheid des Finanzamts für Körperschaften I Berlin vom 29.08.2011 (Steuernummer 27/663/59791) gemäß § 5 Abs. 1 Nr. 9 KStG von der Körperschaftssteuer befreit. Es wird bestätigt, dass die Zuwendung nur zur Förderung des Völkerverständigungsgedankens (im Sinne der Anlage 1 - zu § 48 Abs. 2 EStDV - im Abschnitt A Nr. 10) verwendet wird (Verwendung kann auch im Ausland sein).

**Andreas Diemel, Schatzmeister *<gea.tr@esperanto.de>***

# Kritik an der Sprachenpolitik der EU

**Jürgen Trabant, Romanist und Linguist, kritisierte in der Frankfurter Allgemeinen Zeitung die Sprachenpolitik der EU, welche zur Abnahme und zum Prestigeverlust der Nationalsprachen führen könne. Die Charta der Grundrechte der EU würdigt die Mehrsprachigkeit, und so stellt auch der Vertrag von Lissabon fest, die EU wahre „den Reichtum ihrer kulturellen und sprachlichen Vielfalt" und sorge "für den Schutz und die Entwicklung des kulturellen Erbes Europas“.**

In der Praxis aber wandelte die EU das Sprachen-Kommissariat in eine Unterabteilung um, nachdem der Sprachkommissar neben der offiziellen EU-Empfehlung, nach der jeder Europäer drei Sprachen lernen soll, eine „Adoptiv-Sprache“ empfohlen hatte. Denn die Europäer lernten in der Regel neben ihrer Muttersprache nur Englisch, da diese zur Verständigung ausreichte und die Engländer lernten meistens keine Fremdsprache, so dass der EU-Empfehlung nicht gefolgt wurde. Trabant erklärte: „Es kann nicht übersehen werden, dass in vielen Staaten Europas, vor allem in den Ländern Nordeuropas und in Deutschland, eine Politik der sprachlichen Vereinheitlichung des Kontinents betrieben wird.“ Vom Englischen im Kindergarten bis zur Universität finde eine mächtige Anglisierungskampagne statt. Die Propaganda sei ökonomisch geprägt und global.

Trabant: „Wie im Mittelalter (…) oben Latein und unten die Volkssprachen (...) gebraucht wurden, so wird jetzt oben, in den hohen und wichtigen Diskursen, zunehmend die Hohe Sprache Englisch verwendet, unten, im Alltag und bei weniger wichtigen Redeanlässen, die alten Nationalsprachen.“ Denkbar sei auch eine völlige sprachliche Vereinheitlichung. Trabant plädiert für eine funktionale Aufteilung zwischen dem Englischen und den anderen Sprachen, welche die alte Europäität nicht zerstöre. (www.faz.net )

# Mindestens 21 europäische Sprachen vom digitalen Aussterben bedroht

**Die meisten europäischen Sprachen werden in der digitalen Welt unter Umständen nicht überleben. So warnt eine Studie der führenden europäischen Sprachtechnologie-Experten.**

In der Studie von META-NET „Europe’s Languages in the Digital Age“ haben Wissenschaftler den Stand der Sprachtechnologie für 30 der etwa 80 europäischen Sprachen bewertet. Sie kommen zu dem Schluss, dass bei 21 der 30 untersuchten Sprachen ein digitaler Rückhalt nicht existiert oder bestenfalls schwach ist.

Europa muss Maßnahmen ergreifen, um seine Sprachen auf das digitale Zeitalter vorzubereiten, da sie ein wertvoller Bestandteil unseres kulturellen Erbes sind. Die Studie ist in den 30 Bänden der META-NET White Paper Serie ist sowohl online als auch in gedruckter Form erschienen. Jedes White Paper wurde in der Sprache verfasst, über die es berichtet und beinhaltet eine vollständige englische Übersetzung. (*www.juraforum.de*)

## Leserbrief

**zu „Esperanto-Wörter im täglichen Leben“, Esperanto aktuell 2012/5, S. 15**

Ein kleiner Hinweis: Ludo ist kein Markenname, sondern eigentlich eine internationale Bezeichnung für ein ähnliches Spiel wie das abgebildete Mensch-ärgere-dich-nicht, im britischen Englisch aber auch für Mensch-ärgere-dich-nicht verwendet.

**Reinhard Pflüger**

# SANO 3

**Pli kaj pli da homoj nun denove demandas pro la jarfina semajno „SANO 3", de la 27a de decembro 2012 ĝis la 3a de januaro 2013 en Herzberg-Sieber. Kompreneble ĝi okazos, sed en alia Esperanto-medio.**

**A)** Nun ja funkcias la „esperantlingva hotelo Zum Pass" en Herzberg-Sieber. La posedantinoj estas Teresa Liberska kaj la filino Barbara Khan. Ambaŭ bone parolas Esperanton. Multaj jam konas ilin.

**1.** Eĉ la manĝokartoj estas esperantlingvaj. Bonaj kuiristoj zorgos por frandplenaj tagoj.

**2.** Laŭ nia scio la tranoktado en la tristela hotelo kun bona matenmanĝo kostas nur 25,00 €. Manĝaĵoj estas surloke mendeblaj.

**3.** Silvestrobalo kun bona, eĉ esperantlingva muziko estas senpere mendebla en la hotelo. Kial ne foje esplori la novan kaj unikan Esperanto-oferton?

**B)** La Interkultura Centro Herzberg / Germana Esperanto-Centro nur zorgos por la kulturkadroprogramo, ekz. migradoj, prelegoj kaj akompanado dum ekskursoj. Kompreneble ni vizitos ankaŭ la Interkulturan Centron Herzberg. En Herzberg, la Esperanto-urbo ekzistas la plej multaj esperantrilataj servoj en la mondo.

Nemembroj de Esperanto-Gesellschaft Südharz pagos kulturkotizon de 10,00 € por ĉiuj tago kaj persono. Studentoj povas uzi kelkajn favorprezajn tranoktocxambrojn de ICH (Germana Esperanto-Centro).

**C)** Bv. baldaŭ aliĝi ĉe Hotel zum Pass, nome ĉe Teresa Liberska: *teresa.liberska@gmail.com*. Krome bv. sendi kopion al: *esperanto-zentrum@web.de.*

Anticipe ni dankas kaj kore salutas via ICH,


komisie de la esperantlingva „Hotel zum Pass"



Esperanto-hotelo kun kafejo, restoracio kaj bierĝardeno posedata kaj funkciigata de plurgeneracia Esperanto-familio, kiu translokiĝis al Herzberg.

# Scienca Revuo

**Por la Esperanto-movado la plej grava scienca gazeto evidente estas *Scienca Revuo*. En ĝi aperis multaj fakartikoloj el diversaj sciencaj branĉoj, ekz. medicino, botaniko, matematiko, kemio, literaturo, fiziko, veterinarmedicino.**




